

Malhela jaro, 1935.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 novembro 16.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-157/Radiokasedo-157-A-977-1985-nov-dec-Claude-kaj-Andree-GACOND-Malhela-jaro-1935.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ni memoru, ke antaŭ ekzakte kvindek jaroj la naziismo malpermesis ĉian instruadon de esperanto. Kiam oni tralegas la revuon ESPERANTO de UEA por intimiĝi kun la eventoj de la jaro 1935 tuj oni rimarkas etoson, kiu komprenigas, kial la tiama reorganizo de UEA nur povis konduki al neevitebla kriza situacio.

A.- En januaro 1935 la revuo ESPERANTO komenciĝas kun speco de batal-alvoko de la germano A. VOGT, kiu estis la vicprezidanto de UEA. Tiu ĉi artikolo en sia formulado kaj en sia tono ŝokis la esperantistojn. Titole ĝi anoncis "novan celon kaj novan spiriton!" Fakte ĝi estis alvoko al disciplino. Aŭdu kelkajn signifajn citaĵojn:

Cl.- "Por atingo de tiu ĉi celo...

A.- tio estas la rekonigo de la helplingvo Esperanto en ĉiuj landoj de l'mondo...

Cl.- Por atingo de tiu ĉi celo oni devas uzi ĉiujn iel aplikeblajn rimedojn... Nia signalvorto devas esti: batalo! La unua premiso por sukcese farota batalo estas bonaj batalantoj. Kiajn kvalitojn devas bavi bona batalanto? Antaŭ ĉio li devas montri oferemon, poste diciplinon kaj subordiĝemon, fine kuraĝon.

A.- Kaj la vicprezidanto de UEA daŭrigas:

C1.- "Kiel gvidantoj ni devas havi batalantojn, kiuj posedas tiujn ĉi ecojn. Ĉiuj aliaj estas por ni senvalora balasto..."

A.- Oni kvazaŭ aŭdas paroladon de Adolf HITLER aŭ de Benito MUSSOLINI. La vicprezidanto de UEA eĉ ne konscias, ke klereco, regado de la lingvo, verk talento politike libera, progreso de la instru-metodiko, libroeldonado, estas fortoj multe superaj al batalema disciplino subordiĝema. Ĝojige, ke tiuj kvalitoj tiam rifuĝis en la Internacia Esperanto-Instituto, kies organo LA PRAKTIKO neniel submetiĝis al la faŝisma obeismo, en la eldonagado de la budapeŝta LITERATURA MONDO kaj ankaŭ en la pli kaj pli persekutata SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA, kies malpermeso en Germanio apenaŭ kontraŭstaras la UEA-gvidantaro. La veraj lumturoj de la tiama esperanto estos fakte LA PRAKTIKO, LITERATURA MONDO, SENNACIULO kaj ne la revuo ESPERANTO, kies alvokojn la esperantistoj ne obeos.

Cl.- En 1935 la 27-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Romo kaj ĝin solene malfermos la itala nacia himno kaj itallingvaj paroladoj de la ŝtata subsekretario Tumedei kaj de lia ekscelenco Benito Mussolini, ĉefo de la registaro. La kompromitiĝoj kun la faŝisma diktaturo nenion alportos favore al esperanto, kontraŭe.

A.- Sed ni citu pliajn frazojn el la alvoko de la vicprezidanto de UEA:

Cl.- "Ni estas batalanta organizacio. Kaj ĉiŭ, kiu aliĝas al ni, devas esti penetrita de tiu ĉi penso. Batali signifas: fari oferojn. Batali signifas: subordiĝi al la granda celo de l' batalo.

A.- Ne aliajn parolojn prononcos Benito Mussolini kaj Adolf Hitler. Aŭdu plu:

Cl.- Batali signifas: esti malegoisma. Ankoraŭ ĉiam estas decida la kvalito de batalantoj, kaj ne la kvanto. Tiel estis kaj restos ĉiam. Nur veraj batalantoj devas esti vokataj al gvida posteno en la esperantistaro, eĉ se temas nur pri la malplej grava, tiu de grupestro. Devas esti honoro, povi gvjdi la esperantistaron kaj por la gviditoj devas esti ĝojo, havi gvidanton, plenumantan siajn devojn ĝis la plej lasta punkto."

A.- Kio mankas en tiu alvoko de VOGT, estas la difino de tiu lasta punkto.

Cl.- Oni troviĝas subite antaŭ hierarkiema sinteno. Tute supre, kiel nova prezidanto de UEA troviĝas franca eks-generalo, Louis BASTIEN. Kaj la lingvaĵo fariĝas pli kaj pli milite batalema. En junio 1935 malgranda artikolo de Delfi DALMAU ricevas la titolon "Malgrandaj nacioj al la fronto!" Oni komprenas, ke Edmond PRIVAT rifuzos sian kunlaboron kaj submetiĝon al tia UEA.

A.- La subita morto de Robert KREUZ, la direktoro de UEA kaj redaktoro de ESPERANTO komence de 1936 signifos la finon de la Ĝeneva periodo. Jam la postan monaton en marto 1936, sub la titolo "Gravaj decidoj", la prezidanto generalo Louis BASTIEN anoncos, ke la sidejo de UEA translokiĝos al Londono. Fakte tio efektiviĝos nur sub nova organiza nomo. Sed pri tio ni raportos la venontan jaron, kiam ni rigardos al tio, kio okazis antaŭ kvindek jaroj. Ni revenu al la jaro 1935.

Cl.- En julio 1935 la revuo ESPERANTO publikigas en esperanto tradukon la dekreton numero 283 titolita Esperanto-Lingvo, kiu malpermesas la instruadon de esperanto en la ŝtataj lernejoj de Germanio.

A.- Jen tiu teksto:

Cl.- "la zorgo pri arte kreitaj mond-help-lingvoj kiel Esperanto ne havas lokon en la nacisocialista ŝtato. Ĝia uzo kaŭzas malfortigadon de esencaj valorajoj de popola karaktereco. Tial estas nekonsiderota ĉia akcelo de instruo pri tiaj lingvoj. Instruejoj ne estas disponigitaj por tiu ĉi celo."

A.- La gvidanto de la Germana Esperanto-Asocio, s-ro inĝeniero Kurt WALTHER en Dresdeno, direktis 55 pagan memorandumon al la ministro. En akompana letero li eksplicite informiĝis, ĉu la dekreto ĵus citita signifas malpermeson de Esperanto en Germanujo. Jen la esperantigo de la ricevita respondo subskrihita laŭ komisiono de d-ro BUTTMANN:

Cl.- "Pro principaj konsideroj mi ne povas plenumi la petojn esprimatajn en la supre menciitaj skribaĵoj. La okupiĝo pri arte kreitaj mondlingvoj, kiel Esperanto, ne estos malpermesata de mi, sed ankaŭ ĝuos nenian ŝtatan akcelon."

A.- Tio ne malhelpos la saman reĝimon utiligi esperanton por sia propagando eksterlanda, dum ĝi neniigos la aktivecojn de la esperantistoj.

Cl.- Jen la tragika situacio de esperanto antaŭ kvindek jaroj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée GAGOND legos dum la venontaj ĵaŭdoj aliajn tekstojn aperintaj en la revuo ESPERANTO en 1935. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*